Pro la lasta glaciario, ĉu envere malaperis la homo de Kromanjono? Tiukaze, de kiu kontinento descendis la homoj en Eŭropon, ĝin reloĝigante? De Afriko? La homo de Afriko sin distingas de tiu de Eŭropo pro haŭtkoloro, hararo, evoluskalo, ktp. De Azio? Ankaŭ tiu apartenas al alia raso kaj estas tute malsimila al tiu de Eŭropo. Do, oni supozus ke tiu homo alvenis de Hindujo. Sed ĉu tiu hipotezo estas konvinka? Hindujo, kvankam pro grandeco, povas nomiĝi kontinento, loĝiĝas de homoj apartenantaj inter la rasoj de Azio kaj de Eŭropo. La logiko demandas ke hindo estu ia miksaĵo de ambaŭ menciitaj rasoj. Natute ties kvalitoj estos pli apude al tiu kun kiu la rilatoj estas pli fortaj. La ebla vojaĝpasejoj ekzistas okcidente de Hindujo, kvankam la eblecoj kun oriento same estas sufiĉe oportunaj. Ni supozu ke la rilatoj kun Eŭropo estis pli bonaj ol kun la ceteraj partoj de Azio, kvankam la renkontiĝoj kun oriento realiĝas pli bone tra la mallarĝa terstrio de la marbordo de Hindoĉinio, sed ankaŭ tra montoj kun taŭgaj gorĝoj en Tibeto. Ĉu eblas akcepti ke la loĝantoj de Hindujo alvenis en Eŭropon kaj loĝiĝis ĉi kontinenton, restinta malplena, post la lasta glaciario? Ĉu tio estas la kialo ke la homo de Eŭropo multe similas al tiu de Hindujo?

La ideo ke la homo de Eŭropo alvenis de Hindujo, ne ŝajnas al mi prave rezonita. Eŭropo havas larĝan etendiĝon, de nordo al sudo, je subtropika klimato, kiun ni kutime nomas mediteranea. Ĉu vere la tuta loĝantaro de Eŭropo entombiĝis sub glaciojn kaj ne plu restis eĉ malgranda homgrupo, en suda parto? Se ni hipotezus tiun lastan ideon, kiajn argumentoj ĝin subtenus?

Ni konscias ke kunfrontiĝi al la scienca opinio jam akceptita ĝenerale de eŭropanoj, ne estas facile. Sed, oni devas akcepti, ke la konkludoj de eŭropaj sciencistoj, iliaj argumentoj kaj tezoj kontentigis la demandojn starigitaj tiamtempe. Nun estas pliigitaj ege la scioj kaj naskiĝis novaj demandoj, pli grandaj, por eklumigi tiun historian veron, influinta en la evoluigo de la homaro kaj lingvoj en nia Planedo. La solvoj ofertataj tiutempe, ne eksplikas la novajn demandojn, des pli ke ili evidentigas la faritajn erarojn pro hastaj konkludoj. Tio igas necesa la revizion de la rezonado, ne rezistinta al la tempo. Tiel, hodiaŭ ne povas plu akceptati tiuj rezonadoj per limigitaj ideoj mezepokaj, laŭ kiuj en la tuta tiu granda Eŭropo la klimataj kondiĉoj estis ĉie la samaj, dum la periodo de la lasta glaciario, je 13 500 jarojn antaŭe.

Oni devas ekspliki pli klare la problemojn, devas rigardi pli trankvile la tiutempajn cirkonstancojn. La rabieco de la glaciario etendiĝis de nordo al sudo de Eŭropo, sed, certe, la frostoj estis pli forta pli proksime al la nordo kaj pli malforta je direkto de sudo.

La kialo de la diferenco inter la kondiĉoj en nordo kaj sudo estis ke tiutempe, la norda vintro estis tro longdaŭra kaj la homo de tiuj areoj tre malfacile certigis al si hejton kaj nutraĵojn por la vintro, kiuj povus longi eĉ kelkajn jarojn sinsekve. Sude, kontraŭe, la rokoj estis kalkecaj kaj la

karsta agado estas forminta grotojn kaj kavernojn. En ili la lokaj loĝantoj povus trovi rifuĝon kaj hejton, dum ventegoj, kiuj levis neĝpulvoron ekster ilin. Sude, ene de kavernoj, eĉ dum la plej severa vintro, apenaŭ povus eniri la frostoj, en la profundon de la grotoj. En tiuj lokojn alkuris tiuj evoluintaj homoj, kiuj jam scipovis ekspluati la fajron por hejtigi sin sufiĉe kaj por eskapi de la longdaŭraj vintraj frostegoj. Kompreneble, ankaŭ en la kondiĉoj antaŭ la glaciarioj, ili jam konis la malvarman sezonon kaj al kutimiĝis ekbruligi fajron kaj sin defendi de malvarmo dumvintre. Diference de longdaŭraj vintroj, dum la glaciario, ĉi lastaj longis multe pli kaj estis frostegaj. La glaciario ja alvenis tondre, sed ne nur per unu butonpremo. La malvarmo fariĝis pli kaj pli kruela, de jaro al jaro, sed ankaŭ la loĝantoj laboris pli multe, por ke ili pasigu je malpli da suferadoj la vintron, certigi al si pli da brulligno kaj nutraĵoj (kverkaĵoj). La necesa demando por survivi, igis la homojn labori pli multe, trovi ankaŭ novajn manierojn por certigi la necesajn, samtempe, kiel dum la pasintaj jaroj. Tio alportis evoluon, sed ankaŭ pli altan atenton al tiuj ŝanĝiĝoj okazantaj de jaro al jaro. Nature estis ankaŭ homoj kiuj sekvis trankvilanime la disvolviĝojn de la naturo kaj ne montris tiom da zorgo al la ŝanĝiĝoj. Ili kvankam havis sekuran rifuĝejon, ne povis rezistadi al la vintroj ĉar ne sukcesis certigi al si la nutraĵon sufiĉan. Ili viktimiĝis pro la lameco de sia vivo. Ni opinias ke ili konsistigis eĉ la plimulton. Do, survivis nur tiuj kiuj adaptiĝis al la kontinue novaj kondiĉoj. Tiel, nur malmulte da homoj, kiuj pliigis la laboron kaj atente mon, sukcesis survivi, en stato ege strikta, kiam la glaciario atingis sian plej grandan frostigantan forton.

Kio supozeble okazis tiutempe, altirante la atenton nian, por ke estigu la plej grandan revolucion kaj la lastan de la homo? Inter la loĝantoj de la kalkecaj grotoj sude de Eŭropo, nome en Okcidenta Balkanio, kompreneble, nur malmulte povis survivi, sed fakte survivis. Ili kunfrontiĝis la grandegajn malfacilaĵojn por trovi nutraĵojn kaj povis labori tre limigite. Tio estas influinta verŝajne multe en la vivo tiutempe ene de grotoj. Tiel, se ni disponis pri skeletoj de du loĝantoj, unu el la periodo antaŭ la glaciario kaj la cetero je ties fino, ni ekvidus certe tre notindajn diferencojn. Eble, la observanto, ilin esploranta, povus fari ankaŭ la naturan eraron, konsideri kreskiĝinta la homon antaŭ la glaciario, dum tiun de la glaciario, mem, infanon, tiom multe devus esti malgrandiĝi tiu lasta. Do, pro malfacilaj vivkondiĉoj ilia korpo estis kontrahigita.

La lasta revolucio

La lasta glaciario, preter la tro malvarmaj kaj longedaŭraj vintroj, influintaj en la pereado de grandaj populacioj, tamen estas kreintaj neripetablajn kondiĉojn, kiuj estas donintaj grandan impeton al la evoluiĝo de homaro. Tiucele, ni ekvolus akcenti ke tiu vivo tro malfacila, alportis la veran lastan revolucion, kaj plej grandan, tiun kiu survojiĝis la populacion al la evoluiĝo de la vera homo.

La homo de Eŭropo estis akirinta grandajn ŝanĝiĝojn, pli evidentaj ol tiujn akiritaj jam, eĉ dum pli mallonga tempoperiodo. Tamen, li daŭre estis ligita, ankoraŭ tre malvaste al la naturo, pluestis iamaniero ties filo.

En la grotoj la kondiĉoj ŝanĝiĝis. Tien ili ne povis alkuri por diri ke ili vidis iun urson aŭ leonon. Same ili ne kapablis rakonti okazintaĵon aŭ antaŭvidi kion ili farus venontan tagon kaj kompili kune la planojn. Por ili estis malfacile esprimi deziron aŭ ideon.

Do, la vivo en la kavernoj starigis novajn demandojn. Dum sinsekvaj monatoj, dum longedaŭra malvarma vintro, la homoj vivis fermitaj en grotoj. Tiu vivo, duone adstringa, ŝtopita kaj dividita disde la naturo, kiam la homo ne povis eliri eksteren, naskis la deziron fari ion, almenaŭ, eldiri iun penson, eĉ en la kondiĉoj de mallumo, kiam ili apenaŭ povis vidi unu la alian. Kurte, estis necese ke ili diru unu al la alia kion ili devus fari por eskapi de la danĝero de frostiĝo. Estis, do, plej necese ekparoli. Tiel, restado senmove naskis la bezonon por trovi alian manieron de

esprimo, la bezonon por paroli. Kompreneble, tiu bezono ne solviĝis tuje sed malrapide, kreante la unuajn parolojn konsistantaj je unu sono aŭ silabo, ĉiu el kiuj esprimis ja iun penson, tiom dezirata por eldirati ankaŭ en la mallumo, instiganta homojn fari la ĝustajn moviĝojn. Ili povus diri al pli juna eliri eksteren kaj observi, ĉu estas tago aŭ nokto, ĉu la ŝtormo daŭras aŭ ĉesis, ĉu estas suno en la ĉielo, por ke ili certigu al si brullignon kaj ceteraĵojn, kaj ĉu la vintro longedaŭris. Kaj multaj kaj multaj aferoj prizorgigis la fermiĝintajn homojn pro ŝtorma teruro. Somere, kiam la neĝo kaj la glacioj retiriĝis en la montopintojn, ili eliris ĝojaj ĉirkaŭen de sia groto.

La plej gravaj laboroj iliaj estis certe la pliiĝo de proviantoj kaj brulligno. Tiel, tiuj loĝantoj ekbalutantaj la unuajn vortojn, komencis uzi la parolojn ankaŭ en la naturo. Ekstere, la vortoj akiris pli vastan sencon kaj la homoj komprenis ke la vortoj estis tre utilaj por sia vivo. Uzante la unuajn vortojn, ili komprenis ke ili povus interkomunikiĝi ankaŭ kiam ili estis for unu de la alia, eĉ kiam ili ne povis vidi unu la alian. Tiu nova magio igis ilin adaptiĝi pli bone en la naturo kaj senti la similulojn tre proksime al si mem, eĉ kiam ties voĉon ili apenaŭ povis aŭdi.

Ili sentis unu la alian apud sin ankaŭ kiam la alia troviĝis sufiĉe for. La naturo instigis ilin krei vortojn, konforme al la novaj kondiĉoj, por igi la vivon pli facila. Ju pli multe fariĝis la vortoj, des pli klaraj kaj kompletaj estiĝis iliaj imagoj pri sia vivo. Tiamaniere disvolviĝis la pensado ĉe tiuj homoj. En la tempo kiam ili estis ankoraŭ senkonsciaj pri tio farata de ili, pri la parolado, kiu donus al la homo la pensadon, disigus ĝin iamaniere disde la naturo mem por ke fariĝu, kiel oni diras “mastro de Naturo”, komenciĝis la plej granda revolucio kaj la lasta en la vivo de la homaro. Ni devas agnoski ke ankaŭ nun, kiam la homo sentas sin grandan sinjoron, ne povas esti envere “mastro de Naturo”, ĉar lia vivo estas ligita tre malvaste al ĝi kaj li estos feliĉa dum tiom da tempo kiom li kunvivos harmonie kun la naturo.

Kiam, de tempo al tempo, la glaciara furiozeco estis falanta, li komencis plilarĝigi sian ĉasareon kaj brullignoareon. Post multaj jarcentoj, li estis plimultiĝanta rapidritme kaj serĉanta novajn areojn, konsciiĝinte tutpotenca super la naturon. Tamen, tiutempe, li hazarde ekvidis aliajn loĝantojn (tio povas esti okazinta ne dum la unua fazo, sed kiam li estis elirinta de lia areo, por eniri en areojn, kie la lasta glaciario ne sukcesis establi sian frostigan potencon), kiuj samkiel ili, rigidiĝis ekvidinte fremdajn homojn, nekapablaj paroli kaj esprimi siajn pensojn, kvankam ankaŭ ili laboris por survivi. Inter ili povus eksplodiĝi ankaŭ kvereloj por domini lokojn, sed ankaŭ ĉe ili ardis la deziro por ekscii ion novan de tiuj estaĵoj, similaj al ili. Tio povus esti okazinta ĉe la limo de ambaŭ grandaj disdividaj areoj. La apero de la homo, ekparolinta, en naturo, kaj la hazardaj renkontiĝoj inter ili igis ke la postrestintaj eklernu de la unuaj.

Ni devas agnoski ke samaj kondiĉoj laŭopinie povus esti estintaj ankaŭ 35 000 jarojn antaŭe, kiam « malaperis » la Homo de Neandertalo. Ankaŭ tiam dikaj glacioj kovris Eŭropon. La Homo de Neandertalo, kvankam estis atinginta grandan evoluiĝon, ne sukcesis fari la lastan revolucion, ĉar eble ne posedis tiun gradon de evoluiĝo kiun ja ekposedis la Homo de Kromanjono, por ke faru la revolucion de la granda evoluiĝo. Tio, eble pro fakto ke neniu el ili survivinta de la unua glaciario, ne plu restis plene izolitaj en la grotoj, kiel okazis al la Homo de Kromanjono. La esploristoj opinias ke la Homo de Neandertalo ekspluatis ankaŭ la fajron por hejtado, tamen tio ne helpis lin fari tiun revolucion, tiom necesa por la evoluiĝo de la homo.

Tial, la estiĝo de ĉi tiu mirakla revolucio, eĉ en ununura groto, ne devas mirigi nin.

Kiel disvastiĝis la lingvo

Do, oni ne ekskludas, ke povas esti savita nur unu sola grupo kaj ties posteuloj, ni insistas, estas loĝintaj en Sud-Okcidenta Balkanio. Dum multaj jarcentoj, ili estas plimultiĝintaj kaj estas loĝigintaj la tutan Balkanion, por ke disvastiĝu pluen en Eŭropon kaj aliajn kontinentojn.

La jarcentoj pasis kaj la loĝantoj en la sudo de Eŭropo, ĝuintaj la fruktojn de la plua evoluigo, plimultiĝis senĉese.

Ili, savite de la morto, sub la pezo de la glacio, eliris aliĝinte de la glaciario. Ili aperis per pli evoluinta laringo kaj kapablis prononci vortojn kaj eĉ la unuajn frazojn. Ĉi lastaj envere estis nur iaj balbutaĵoj, aŭ pli precize, la unua granda paŝo de la homaro, laŭlonge de la kompleta evoluigo. Neniu alia progreso estis ebla al la homaro, se ĝi ne sukcesis paroli. La mutulo neniam estus kapabla ŝanĝi la medion kaj sian vivon.

Kio okazis poste al la grota homo kiu ekparolis, kiam la forto de la glaciario estis elĉerpiĝante kaj ĝi mem estis retiriĝante.

La ekparolanta homo, kiu estiĝos la vera transformanto de la mondo, kiun ni povas nomi, ne timante ke ni hastas, la vera homo, transpasinte la longan tempoperiodon de neviditaj uraganoj, sin sentis pli forta. Li eliris de la groto por certigi al si abundan nutraĵon kaj revenis denove en lia grota loĝloko. En tiu fazo li estis manĝante ĉiam pli bone kaj lia korpo estis disvolviĝante kaj pligrandiĝante. Ankaŭ la parolkapablo pliiĝis kaj pliriĉiĝis. La parolkapablo rilatiĝis al la evoluigo de la cerbo kaj la pensado.

La grota homo, ne forgesis ke ĝuste la kavernoj savis lin kontraŭ malvarmo, sed ankaŭ kontraŭ la bestioj. Tion li prikonsideris ankaŭ elirinte de la groto. La eliron en la naturon instigis kelkaj kialoj : la pliiĝo de la homnombro, kio starigis la demandon por pli da nutraĵoj kaj brulligno. Ĉi tiuj povus troviĝi abunde nur se la loĝloko estis pli proksime al la areoj je riĉaj naturaj resursoj. Tamen, en la novaj kondiĉoj naskiĝis ankaŭ aliaj zorgoj. Ekster la groto ili devus esti pli atentaj por hejtigi la novan loĝejon, ĉar la impeta disvolviĝo alportis pliboniĝojn en la vivo, sed ankaŭ pli da deziroj. Ĉi tiu homo, je ĉiam pli altaj demandoj, fondis novajn loĝlokojn, sekurigitaj kontraŭ la malvarmo kaj protektitaj kontraŭ la bestioj, dum la dormotempo.

Sed kiam la evoluo komenciĝas, ĝi ne haltas. Tiu homo, sur ties vojo, faros ankaŭ malkovrojn, por ke igu sian vivon pli bona. Tiel, li inventos ilaron, rimedojn kaj vivmanierojn, kiuj helpas al li por plifaciligi la vivkondiĉojn, sed ankaŭ por igi lin pli kapabla por adaptiĝi al la novaj cirkonstancoj. La bezonoj kreskis, sed same ankaŭ la klopodoj survoje de evoluigo pliiĝis. Tiuj homoj, je pli grandaj eblecoj, fariĝis pli kuraĝaj serĉante novajn areojn kaj pli bonan vivon. Tiamaniere, el la tribanoj, eliris homoj tre kuraĝaj, kiuj ekiris ekkoni la ĉirkaŭantajn areojn. Tiuj fondus la unuajn koloniojn en la malkovritaj areoj, kiuj dum la paso de la tempo, disvastiĝis tra Balkanio, kaj poste ekster ĝin. La unuaj legendoj pri foraj landoj, fariĝis instigiloj por pli multe malkovri. Aliuloj ekirus pli foren kaj diversdirekten.

La jaroj pasis, dum ili, ĉiam pli, fariĝis kuraĝaj, serĉante la nekonaton kaj vojaĝis tuttempe, pli fore. Dumvoje ili spertis novajn aventurojn, sed ankaŭ ilia fantazio kreskiĝis. Ili vidis tion kion antaŭe eĉ ne povus imagi kaj ĉe ili pliiĝis la deziro por ekspliki la novajn fenomenojn. Tiamaniere la vortoj pliiĝis, sed ankaŭ la rezonado disvolviĝis.

Dume la glaciario retiriĝis en la montojn, kaj en sian kaŝloĝejon en la Frostigitan Nordan Oceanon. Kaj la vintroj fariĝis ĉiam pli mallongaj kaj je ĉiam malpli da furiozeco. La akvaro de Mediteraneo estis liberigata ĉiam pli disde la glacioj. Same la Adriatika Maro

estis senvestigata disde la glacioj. En la Suda Eŭropo ekaperis herbaro kaj kelkaj bestoj eksentis ke ili povus vivi ankaŭ tie. La antaŭaj estis la birdoj alvenintaj de la nordo de Afriko. Poste, surtere, ekaperis ankaŭ aliaj bestoj, kiuj disvastiĝis kaj plimultiĝis.

Ankaŭ la homo, jam ekipita per novaj kvalitoj, suriris en ambaŭ flankoj de Mediteraneo kaj Nigra Maro, foje surpiede kaj foje navigante sur arbotrunkoj. Post iom da tempo li rimarkis ke li povus stari pli komode sur ili ĉar la trunkojn post kiam li komencis elĉizi ĉi lastajn kiel pelvon. Estis ja ili la unuaj esploristoj, survoje de ties serĉoj, kiuj farus novajn malkovrojn de landoj kaj fondus novajn loĝlokojn sur la teroj de Eŭropo, restintaj malplenaj, post la degeliĝo de glaciario.

Tiaj homoj ekvojaĝus sur riveroj, en la pli postaj miljaroj, por ke konu la forajn landojn de Eŭropo kaj novajn kontinentojn, por ke kreu la legendojn pri la vojaĝoj de argonaŭtikoj.

La deziro por ekvidi novajn landojn altiris ilin kiel magneton, akompanate de la timo ke ili povus perdi la rilatojn kun siaj proksimuloj, tial ili ne foriris tro. Tio igis ilin, ke postkiam estis malkovrinte ion, reveni denove al la loko, kie loĝis siaj proksimuloj. Sed ankaŭ fondi novajn stablojn tie kie ili trovis plaĉajn kondiĉojn. En tiu fazo ili estis jam tro for de ilia grota vivo, kaj estis elirintaj sub malfermitan ĉielon. Alvenis la tempo de palafitaj konstruaĵoj, do de domoj starigitaj sur lignaj fostoj ĉerande de akvaroj, por ke sekuriĝu de subita inundo fare de bestioj.

Tamen, for aŭ proksime al ili, renkontiĝis aliaj homoj (temas ĉiam pri la suda direkto) kie la influo de la glaciario estis sentita parte aŭ neniom. Tiuj lastaj estis sukcesintaj evoluigi malrapide survoje al progreso, senverte. Ili estis iamaniere en la fazo de la Homo de Neandertalo aŭ de Kromanjono. Sed ne pli. Pro renkontiĝoj kun ili, kreiĝis kondiĉoj por pligrandigi la atingojn, alportantaj pli da disvolviĝoj. Tio helpis en la plivastiĝo de la scioj, kiun hodiaŭ ni nomus « pliigo de la kulturo ». Temas pri la sudo de Mediteraneo kaj Hindujo. En tiuj areoj, rilate la evoluan fazon, ĉar la vivo okazis en landoj je pli varma klimato, ili ja ne sentis la bezonon de parolkapablo. Kiam la novaj loĝantoj alvenis, tiuj lastaj trovis tie la postrestintaj lokanojn, rilate la evolufazon, tial ili alportis la penson, kiu helpis en ties evoluigo. Ĉi tiuj, la homoj de la Sudo, restis mirplenaj pro la paroloj de la nekonatoj. Sub la influo de la novaj loĝantoj, ĵus alvenintaj, ili sentis la bezonon por paroli, komencis ekimiti ilin kaj eklernis paroli la samn lingvaĵon. Tiu estis ja la unua paŝo granda por transformi tiuj estaĵojn en homojn scipovantaj paroli kun la alvenintoj. Tio okazis en ĉiuj landoj sude, kiel en Afriko ĝis en Hindujo.

Antaŭ ol la homoj de sudokcidenta Balkanio ekiru en la ceteran parton de Eŭropo, la homo de Kromanjono estis definitive enterigita, sub glaciojn. Pro tio, la kontinento de Eŭropo, kie la vivo rekomenciĝis denove, devas esti nomita Nova Kontinento. Dum multaj miljaroj poste, ĝis la hodiaŭaj tagoj, ĝi nomiĝas Maljuna Kontinento. Tiu nomo naskiĝis ĉar ties loĝantoj disvastiĝis en Amerikan kontinenton (norden kaj suden), kiuj nomiĝis « Novaj kontinentoj ».

Ĉu hindoeŭropeca lingvo ?

La disvastiĝo de la homo de Balkanio en Eŭropon eksplikas kial do tiu lasta, havis ekde pratempo, komunan primitivan lingvon (la Pelazgan), kiun la eŭropaj esploristoj, pro nekapableco ekspliki, nomis erare « Hindo-eŭropeca ». Kaj branĉoj de tiu lingvo, iel ŝanĝiĝintaj, disvastiĝis ankaŭ sur ambaŭ kontinentojn de Ameriko.

La baza leksiko de ĉiuj eŭropaj lingvoj devenas de la unuaj vortoj de la primitiva homo de Eŭropo, kiujn li estis lerninta ekde la tempo kiam li estis loĝanto de Sudo. Sed post kiam pasis kelkaj miljaroj, al la vortaro aldoniĝis novaj vortoj, pliriĉigante ĝin pluen. Tiel, al la baza leksiko algluiĝis ankaŭ aldonaj vortoj, kreitaj sur novaj terenoj.

La homo de Eŭropo, antaŭ ĉirkaŭ du jarcentoj, ne kapabla ekspliki la kialojn de la komunaj vortoj de la tutaj popoloj de la kontinento, komencis la eraran kampanjon de « purigo ». Ili klopodis purigi la lingvojn disde la vortoj, kiuj kelkiu konsideris « entruditaj perforte pro ilira okupado, en la pratempo ». Tiam oni parolis pri panilirismo kaj komenciĝis la kampanjo kontraŭ ĝin, nesciante la veron. Nekredeblo konsistas en tio ke kvankam oni purigis la lingvojn disde la ilira,

tamen, ankoraŭ en la leksiko de eŭropecaj lingvoj plurestas vortoj de tiu pratempa lingvo. Eĉ mem la angla, pli granda lingvo nuntempe, per kiu interkomunikiĝas la popoloj enmonde, sur ties fundamento, havas tiun lingvon nomata pelazga (ilira aŭ albana). Ili forgesas ke la bazaj vortoj de tiu lingvo ne povis enstrudiĝi perforte poste, sed estas ja ties unuaj vortoj, pro tio ili kuŝas en la fundamento de ties leksiko.

Ĉu ni eraras, kiam tiun eŭropan lingvojn konsideras plej pratempan ? Estas ja donitaĵoj ke en Hindujo, je dek aŭ dekunu miljaroj antaŭe, estis fondita la unua urbo, kiu nuntempe troviĝas subakve, kiam en Eŭropo apenaŭ ekzistis urboj. Ĉu tio ne montras ke la evoluo estas komenciĝinta unue en tiu lando ? Tiu fakto estas forta rezono, kiu dubindigas la eblecon de la naskiĝo de la parolkapablo unue en Eŭropo, kaj poste disvastiĝadon ankaŭ en ĉirkaŭantajn kontinentojn. Ni ne forgesu ke la homo de Kromanĵono ekkonstruis ŝtonajn murojn, por sin defendi de bestioj multaj miljaroj antaŭe. Se ni volas ekspliki la fakton pri la hinda urbo, ni demandu : se estas tiel, la lingvo estus disvolviĝinta impete ankaŭ en la suda Afriko. Kial tio ne okazis do ? La respondo estas simpla : oni devus senti bezonon por tio, por pensi kaj inventi, alie oni plurestus porĉiame senlingve. Hindujo, estante lando je milda klimato, kie la homoj moviĝis kaj vivadis ne sentante la bezonon de la lingvo, ne kapablis disvolvi la paroladon. Ni forgesu tiun eksplikon kaj prikonsideru alian : ni pensu ke envere la hindoj inventis la paroladon. La parolado disvastiĝas en ĉiujn direktojn, do de sudo al nordo, de oriento al okcidento, ĉar la kulturo iras tiel kiel la lumradio. Tiun leĝecon povas interrompi nur ia natura barilo kiel montovicoj netranspaseblaj de homoj, senfinaj dezertoj aŭ grandegaj ampleksaj akvaj basenoj. Io tia ne ekzistis ja inter Hindujo kaj la cetera parto de Azio, precipe en ties suda parto, kiu interligiĝis tra Hinduĉinio. Estas sciite ke ankaŭ la rilatoj inter Tibeto kaj Ĉinio ekzistis ekde pratempo. Tiam, ni povas demandi : kial la hinda lingvo alvenis en la foran Eŭropon, transpasante grandegajn dezertojn kaj ne iris, almenaŭ en Hinduĉinion, poste en Ĉinion kaj pluen, sed nur en Eŭropon ? Ĉu la fakto de eniro de la hinda lingvo en Eŭropon ne miras, kiam ekzistas aliaj faktoj konfirmantaj la kontraŭon, t.e. ke la eŭropa lingvo estas enirinta ĝis Tibeton, aŭ pli ĝuste, la pelazga dialekto de Dardanio de Balkanio, nuntempa Kosovo.

La Pelazga kaj la Albana

Estas sciite ke la pelazga lingvo plurestis viva ankoraŭ ĉe albanoj, al kiuj, sen iu ajn kialo, sed firme senlogike, la gvidantoj de la grandaj ŝtatoj eŭropaj eĉ en XX jarcento, malgrandigis ĉirkaŭ 40 % de la ties loĝantaro kaj surfaco. Tiel, tiaj eraroj estas kaŭzo ke la albana loĝantaro kaj ties lando postrestis tre malgranda, tiomgrade ke estas malfacile ke ĝuste tiu popolo kreis la loĝantaron de Eŭropo kaj ke ties baza lingvo estis ja la Pelazga (nuntempa Albana) !! Ni ripetas, kiel eblas ke en Hindujo fondiĝu urboj antaŭ ol en Eŭropo ? Ni ne forgesu ke la primitiva hinda urbo fondiĝis 2500 jarojn post la glaciario. Daŭre ni demandas : ĉu tio povus esti fondita de hindoj mem, aŭ kunlabore kun ĵus alvenintaj eŭropanoj, post kiam tiuj lastaj estis konstruintaj ŝtonajn murojn, miljaroj antaŭ la hindoj ?

Estas ja tiuj ĉi kaŭzoj, kiuj pripensigas vin, ke la hinda lingvo ne estas importita en Eŭropon, sed kontraŭe tiu lasta estas importita en Hindujojn. Aristidh Kola, en sia libro « La Lingvo de Dioj » paĝo 195, (albana eldono) montras ke la Granda Aleksandro (el Granda Makedonio, hodiaŭ ie proksime de la centro de Albanio) estis la tria invadinto de Hindujo, kiel sin esprimis mem la hindaj pastroj. La unua estis Dioniso, la dua estis Herkulo (albane-ferulo) kaj la tria estis Aleksandro. Ankoraŭ plia kialo : la hinda religio disvastiĝis ne nur en Hindujo, sed ankaŭ en Hinduĉinion ĝis al la fora Ĉinio, sed neniom en Eŭropon. Kial do ? Ĉar la kulturo de Eŭropo estis pli evoluinta ol tiu de Hindujo kaj la kredo je Dioj estis pli malnova en Eŭropo, tial estis malebla

ke eniru la hinda kredo, nepereigante la lokan kredon. La pratempaj grekoj, post kiam ili establiĝis sur la pelazgaj teroj, montras pri la kvalitoj de lokanoj, kiuj foriris dum longaj tempoperiodoj de sia lando kaj denove revenis tien. Pro tio pelazgojn ili nomis « Lelegoj » (cikonioj). Pelazgoj estis al kutimiĝintaj ekde pratempo ekiri por malkovri novajn landojn, sed ankaŭ pro komerco en foraj landoj. La pratempaj popoloj estas profitintaj de la pratempa pelazga kulturo kaj estas lernintaj ties parolmanieron. Pelazgoj, post kiam ili iris en Hindujon, komercis kun la lokanoj kaj revenis hejmen. Verŝajne, kelkiu el ili estas perdinta kaj plurestis tie, fondis novan familion kaj pluloĝis eterne tie. Aliaj, ĉar estis irintaj tro fore, timante ke ili povus perdi la vojon kaj tiel ne sukcesus reveni hejmen, ne tro foriris, tial la pelazga lingvo haltis ĝis Hindujo, ne plu foren. Ni ne forgesu ke en tiuj foraj tempoj, ne ekzistis pavimitaj vojoj, sed nur ŝarĝobestaj vojoj, kiuj kiam la arbaraj arbustoj kreskiĝis rapide, povus fermiĝi kaj la homoj tiel perdis la ligojn kun siaj propraj proksimuloj. Tial la reveno estis tre grava por la kontinuiĝo de la vivo mem.

La faktoj montras ke la parolado startis en eŭropaj grotoj (Sudokcidenta Balkanio) kaj estas radiinta en ĉiujn ĉirkaŭajn areojn. Ĝi, poste, disvastiĝis en Nordan Afrikon, samkiel en Hindujon. La itala esploristo Karapadjo, insistas ke la lingvo de la pratempa Egiptio estas ja tiu de eŭropa Pelazgio. Li, eĉ ties hieroglifojn, eksplikas nur per la pelazga lingvo kaj nuntempa albana. Li eĉ la nomon de la Dio Thot, kiu ĉiam donis konsilojn, trovas en la nuntempa albana kaj aldonas ke tio ne povas esti komprenata per iu ajn alia lingvo. (Thot estas la tria persona formo de la vorto Them= diras). Tiu esploristo, baziĝante sur la nuntempa albana, sukcesis trovi ankaŭ la signifon de multaj vortoj de la pratempa Egiptio. En ties studo ni trovas ankaŭ la plendon de egiptoj, ke ties vera lingvo, ne plu uzatas en Egiptio, sed oni entrudis tra religio la araban. La samon oni povas pensi ankaŭ pri la lingvo de ŝumeroj, kvankam ankoraŭ mi ne havis eblecon trovi studon rilate ĝin.

La lingvo disvastigita tra la tuta baseno de Mediteraneo kaj Nigra Maro estis ja la Pelazga. Tion pruvas plej bone la pelazgaj konstruaĵoj, en preskaŭ la tuta norda Mediteraneo, sed eble ankaŭ en tiu de Nigra Maro. Ili estas postrestintaj ĝis niaj tagoj, tie kie troviĝas la rokoj, taŭgaj por krei la gigandajn grotojn. En tiuj lokoj la pelazga lingvo eniris pura, post kiam estis establiĝintaj la alvenintaj pelazgoj el Balkanio. La nova popolo, je alta inteligenteco, estis pliigata rapidmaniere. Tion asertas malrekte ankaŭ la franco Ĵan Klod Faverial en sia libro « La (plej)malnova historio de Albanio » paĝo 44 (albana eldono)..

Kial tiom multe da lingvaĵoj en Eŭropo ?

Kiel oni eksplikas ke hodiaŭ Eŭropo posedas grandan kvanton da lingvaĵoj, nekompreneblaj unu de la alia ?

La respondo estas simpla : Se vi iros en diversajn regionojn, vi renkontos multajn homojn, parolantajn dialektojn. La pliaĝuloj malfacile komprenas la aliajn dialektojn. La kunfandiĝo de la dialektoj, ene de la lando, estas ebeniginta la regionajn diferencojn, kiuj igis la homojn interkompreniĝi malfacile.

Ni ne forgesu ke ne nur la lernejo, sed ankaŭ la moviĝoj, la oficiala preso, ĵurnaloj, libroj, radio, televizio ka estas influantaj ĉiam pli por transpasi la dialektaĵojn. Tamen, du maljunuloj el diversaj regionoj, de la sama lando, malfacile komprenas unu la alian. Tio validas eĉ por unu malgranda lando kia ja estas Albanio. Kion vi dirus pri aliaj pli grandaj landoj kiel la rusa Siberio, kie estis disvolviĝinta la slava lingvo ? Eŭropo tiujn ĉi problemojn estas solvinta du jarcentojn antaŭe. Tiel la oficiala lingvo estas alproksimiginta la regionajn lingvojn por formi la komunan dialekton. La oficiala dialekto (lingvo) estas kreita surbaze de la dialekto kiu estas influinta plejmulte en la disvolviĝado de tiu regiono (lando). Tiu ĉi dialekto, ni diru tiu de la

centra Germanio, kun tiu de la centro de Francio situantaj for unu de la alia, certe estas kreintaj la oficialajn lingvojn tute diversaj kaj tute nekompreneblaj por la aliuloj. La novaj lingvoj daŭre disvolviĝas en tiaj dimensioj, ke mem ties kreintoj, se ili revenus en la vivon, estus komprenantaj tre malfacile tion post du jarcentoj da vivo.

Ĉu eblas trovi la radikojn de tiuj lingvoj? Ankoraŭ, malbonŝance, en la libroj kaj sciencaj tekstoj daŭre oni skribas pri antaŭeninta lingvo « hindo-eŭropeca », kreita antaŭ 4-5 miljaroj, kiam cetere estas jam dokumentita ke la lingvo en pratempa Egiptio estas skribita antaŭ 7000 jaroj, t.e. la pelazga kaj ne « hindo-eŭropeca ». Mem la sciencistoj ne certas ĉu la lingvo de Eŭropo estas alveninta el Hindujo, aŭ la lingvo de Hindujo estas naskita de tiu eŭropeca. Ili eĉ, de fojo al fojo, pro fakto ke ne estas mem konvinkitaj pro termino kreita mense kaj ne el la vero, transpasas ankaŭ al tezo pri la tiel nomata germana-eŭropeca, ĉar hodiaŭ Germanio estas la plej potenca ŝtato de Eŭropo. Se San Marino estus la plej potenca ŝtato de Eŭropo oni povus paroli ankaŭ pri sanmarino-eŭropeca lingvo !!! Tio okazas pro fakto de la eŭropaj sciencistoj volas, je ĉiu kondiĉo, trovi solvon ne havigante al si la ŝlosilon. Estas multaj esploristoj, kiuj tute hazarde kaj sendepende, trovas tiun ŝlosilon, sed ne iras pluen, por uzi ĝin je celo al malkovro de la kaŝitaĵo. Post kiam ili eldiras ke la Pelazga estas lingvo « proto-hindo-eŭropeca », kvazaŭ ili timas eldiri ion pli, ne dezirante disputi kun la aliaj, tial ili kontentiĝas je tiom.

La lingvo de eŭropaj montaranoj

Antaŭ du jarcentoj, la landoj de Eŭropo, estas farintaj la nepardoneblan eraron de la « purismo » (Purigado) demetante el sia leksiko ĉiujn pelazgajn vortojn, aŭ kiel ili nomiĝis tiam, « iliraj ». Sed ekzistas ankaŭ esploristoj kiuj grave kritikis la malpermeson de la parolado en la Pelazga fare de eŭropecaj montaranoj. La « puritanoj » ne profundigis en la eksplikado kial do en la montoj de Eŭropo troviĝis ĉi tiuj montaranoj, parolantaj ilire (vi povas diri eĉ albane, estas la sama). De kie venis ili? Ili estis pratempaj lokaj loĝantoj, alvenintaj tien, kiam degeliĝis la glaciarioj kaj la tero estis malplenigita de homoj de Kromanjono, por ekformi ilian komunumon novan. Ĉar ili troviĝis proksime de la centro ili estis ligitaj al la pelazga kulturo, kiu estis atinginta tre altajn kulturajn pintojn. Por eklerni de tiu kulturo, ni konsilas legi la reprezentanton de Pelazgio, Diinan Homeron, kiu staras giganta kontraŭ la plej granduloj de la mondo. Ni devas agnoski ke ju pli malproksime de la centro de Pelazgio, de Okcidenta kaj Suda Balkanio kaj Malgranda Azio ni estu, des pli malforte atingas nin la ondoj de tiu majesta kulturo. En la tempo kiam ĝi disvolviĝadis en la tuta Eŭropo, eĉ kvankam malfrue, ĝi atingis ankaŭ la plej forajn ekstremojn kaj Pelazgio evoluis kontinue. Sed kiam en ĝi aperis la unua invadinto, kiu poste nomiĝis « greko », la pelazga kulturo ege fragiliĝis, trafiĝis de nekuraĉebla frapo.

Ni ekspliku kial la albana lingvo parolatis en la montoj de Eŭropo, antaŭ la unueciĝo de la lingvo ene de iu provinco, kiu ekde tiu tempo nomiĝus ŝtato? Se tie estis establita antaŭe pelazgoj, kial do tiu lingvo ne parolatis ankaŭ en la kamparo? La kialo estas simpla. Samtiel pelazgoj de la nuntempa Grekio, ili kaptiĝis surprize, tie okazis ankaŭ en la areoj, kiam alvenis aliaj popoloj. La alvenintoj estis organizitaj kaj konsistigis ĉiam homan plimulton, pro tio ili venkis la batalojn kontraŭ la neorganizitaj lokanoj, okupante ĉiam pli da pelazgaj teroj. La lokanoj militis per malmultaj fortoj kontraŭ la alvenintojn. Estis ja tiu la kaŭzo de la malvenko ilia kaj de la malpliigo de ties nombro.

Parto el ili, por savi la vivon de siaj familioj, eble, ankaŭ esperante je pli bonaj cirkostancoj por repreni siajn terojn, foriris al la montoj kaj komencis tie novan vivon, for de la sangumaj barbarecoj de la okupintoj. Dum la okupantoj estis kontentaj je riĉa vivo en la kamparo aŭ ĉar en la malvastaj montaj gorĝoj estis malfacile venki je egalaj fortoj, ne trafite de grandaj perdoj,

rezonis kiel plej bone pluresti en la kamparo kaj ne grimpi al la montoj. Estas ja tiuj ĉi la kaŭzoj, ke inter ili ekzistis ia amnistio armita, ĝis kiam la armiloj eluziĝis. Dum la plej militema parto de la loka loĝantaro grimpis al la montoj por sin defendi de alvenintoj, la cetera parto, tiu plej kulturema, kaj same pli pacema, daŭre restis en la kamparo, kune kun la okupintoj, enpace kunvivante. Estas rezonebla pensi ke la lokanoj, estante pli proksime al la centro de Pelazgio, ricevis pli da novaj donitaĵoj kaj estis pli evoluintaj ol la alvenintoj. Sed ankaŭ la alvenintoj, apartenis al la pelazga loĝantaro, disvolviĝinta en la foraj regionoj. La ligoj kun la centro de Pelazgio, ĉe la alvenintoj, estis tre malfortaj, tiel ankaŭ ties disvolviĝo, estas irinta en diversajn direktojn, ol tiu de la lokanoj kaj kompreneble ili estis malpli kulturemaj. La diferencoj en la lingvo ĉe ili, en tiu fazo, estis notindaj. Tial ekzistis malkoincidoj, ĝis tiu grado ke ili konsideris sin tute diversa. Germana esploristo, ne havante kompletan sciaron, antaŭ du jarcentoj konkludis erare ke en la germana estas enirintaj multaj iliraj vortoj, post kiam iliroj estas okupintaj Germanion, en pratempo. Sed li ne diras en kiu tempo kaj kie. Kompreneble, ĉiuj liaj studoj baziĝas sur supozoj. Estas akcentinde ke Germanio, kiel nacion, estas kreita en la baseno de la rivero Volga, antaŭ ol ili translokiĝis perforte de slavo, ekokupintaj ties terojn. La restintaj germanoj senpatrie establiĝis en la teroj kie ili vivas hodiaŭ ankoraŭ (samkiel en la teroj kiujn la rusoj okupis dum la Dua Mondmilito kaj insistas ne forlasi ilin, kvazaŭ tie formiĝis la Malgranda Rusio). Kompreneble germanoj eniris en la terojn de la alia regiono, kiu daŭre parolis la pelazgan, pli proksime al la centro. Estas sciite ke tiu popolo ne parolis la Pelazgan tiom pure kiom la albanoj, kiuj estas en la centro de Pelazgio, kvankam ankaŭ la nuntempa albana lingvo estas evoluinta plu. Tamen la montaranoj konservis sian lingvon, ĝis kiam la « purismo » kiu havis kiel sian devon purigi la lingvon, malpermesis al ili paroli ilire por eklerni poste la lingvon de la okupanto (tiutempe la armiloj estis kovritaj de la pulvoro). Kvankam la « purismo » malaperigis multajn pratempajn iliraj vortojn, ankoraŭ postrestis ties spuroj. Tio troveblas facilmaniere de esploristoj, kie ajn ili iras en tiuj montoj. Se vi restos en la regiono de Lizenŝtajn de Aŭstrujo, vi trovos la turismecan vilaĝon je la nomo « Maria Lugao », sur bela valo. Kiam mi diris al mia amiko ke albane tiu nomo sonis « Maria de la valo » li jesigis min kaj eldiris ke tiuj homoj estas ja iliroj sed « integritaj al la aŭstria vivo ». Kaj li aldonis ke ankaŭ li mem estas naskiĝinta « 70 km for de Maria Lugao » kaj estas iliro. Dum alia amiko maljuna, el la ĉirkaŭaĵoj de Salzburgo diris al mi ke lia nepino havis hararon je koloro ruĝeta, montranta je ŝia ilira origino.

Ankaŭ nuntempa germana lingvo, kvankam la « purismo » demetis de ĝi multajn ilirajn vortojn (devenanantaj ekde la tempo kiam en historio ni nomiĝis pelazgoj) ankoraŭ ĝi havas senfinan nombron de vortoj pelazgaj, kies signifoj oni povas ellerni helpe de la albana lingvo. Leginte studlaboraĵon de bona konanto de la germana, mi surpriziĝis de multaj germanaj vortoj, luitaj de la albana, trovitaj en ĝi, sen kiuj la germana lingvo malriĉiĝus pli. Tio pruvas ke la germana komenciĝis de la pelazga. Ne nur en la lingvistiko, sed ankaŭ en la scienco, Pelazgio estas doninta multon. Tie la vortoj hekur, mulli, samkiel la teknologioj por ties produktado kaj kosntruado devenas ekde la tempo de Pelazgio.

Ili estas enirintaj en eŭropecan lingvon, tamen, por kompreni ties originon, oni devas scii nepre la albanan lingvon. Tian estimadon jam faris profesoro de hortikulturo (kulturo de legomoj) Dastalovski el Plovdivo (Bulgario), je la mezo de XX jarcento, kiam multaj legomnomojn li eksplikas per la albana lingvo. Ĉiuj ĉi tiuj faktoj indikas pri la granda evoluo atingita de Pelazgio kaj kiom multe ĝi estas doninta por lernigi eŭropanojn. Same ĝi montras kiom granda estis ja la areo kie etendiĝis la loĝantaro parolanta tiun lingvon en pratempo.

Al ĉiu albano, kiam li eklernas la anglan, ofte ŝajnas ke en ĝi troveblas multaj albanaj vortoj. Tio estas tiel ĉar la angla enhavas multajn neŝanĝitajn kvantoj da vortoj ekde la tempo de Pelazgio. Pri tion ni ne bezonas longe paroli ĉar la usona esploristo Edvin Jak (Edwin Jack) estas pruvinta ke antaŭ 4000 jaroj angloj kaj galoj (nunaj francoj) estas parolintaj albane.

Ankaŭ en la slava lingvo, kvankam slavoj vivis en malvarma fora Siberio, kie la influo estis malforta, oni rimarkas la elementojn de la pelazga lingvo. La ekonomiaj interesoj rilate ilin, pro troa malproksimeco estis malmultaj, tamen ili estas akirintaj la bazan lingvon ne de Azio, sed de Eŭropo. Ankaŭ la portretoj ege similas al tiuj eŭropaj, pli ol al tiuj aziaj. Tio pripensigas nin ke ili estas posteuloj de pelazgoj. Sed, estante pli izolitaj pro malvarmo kaj malproksimeco, la ligoj okazis nur malofte, tial ilia lingvo estas disvolviĝinta en aliaj kondiĉoj. Tamen ankaŭ en la slava lingvo troveblas vortoj, indikantaj ilian pelazgan devenon. Ni prenu la vorton « mal » (monto). Slavo evoluiĝis en Siberio kie estas larĝaj kampoj kaj ne montoj. Tial ili ne ricevis tiun vorton, sed anstataŭigis ĝin per la pelazga vorto « gur » (ŝtono) kiu en la pluralo fariĝas « gura ». Tiun vorton slavo uzis por montri altan lokon, kie pro la erozio de la tertavolo, la ŝtonoj aperas sur la surfaco. Slavo estas transformintaj « u » al « o » kaj diras ne « gura » sed « gora ». La vorton « malësor » (montarano) ili uzas kiel « goran ». Se vi faros studon certe vi trovos tie senfinon da vortoj, samkiel en la germana, angla, itala aŭ franca ka.

La bonoj de komuna lingvo eŭropeca

La profundaj studoj rezultigos al la rezonebla konkludo ke du jarcentoj antaŭe, la esprimaĵo panilirismo, uzata de esploristoj tiamtempaj, ne aperis hazarde, sed kiel logikan konkludon de iliaj studoj. Dum la plimulto de esploristoj venis al la konkludo reala, kontraŭe, la cetero, subtenataj ankaŭ de la tiutempaj regantoj timis pro tia konkludo kaj anstataŭe vidi pli foren, en la komunan estonton de ĉi tiuj popoloj, filoj de ilirismo (pelazgismo aŭ albanismo) kaj pensi por proksimiĝi, ili danke al tiaj regionismaj vidpunktoj faris erarajn agojn. Ili « purigis » sian vortaron de « panilirismo ». La ilira vortaro en la tuta Eŭropo, proksimigus la eŭropanojn kaj ne disigus ilin en regionismoj kaj ties lingvaĵoj-dialektoj. Tiu eraro sekvigis la fondiĝon de ŝtatoj-provincoj kiuj ne interkompreniĝis unu kun la alia. Tiun eraron jam estas sentinta ĉiu loĝanto de Eŭropo en la provincoj (Anglujo, Francio, Germanio, Italio, Hispanio) en ekonomio, politiko, kulturo, scienco, ktp. Se ili kreus ununuran lingvon, la pelazgan, eble la popoloj ne spertus la teruraĵojn de la Unua kaj Dua Mondmilitoj.

Nun Eŭropo klopodas proksimigi la regionojn, kiuj en nuntempaj nocioj nomiĝas nacioj, por fondi Unuiĝintan Eŭropon, sed sen ties patriron, Albanion. Do, oni postulas solvi la erarojn de la pasinteco per disigita stato kaj per mezepokaj pensmanieroj, ankoraŭ regantaj hodiaŭ, kiuj multekostas al eŭropaj popoloj, havantaj same regionismaj pensmanierojn. Ĉi lastajn ducent jarojn estas notitaj atingoj eĉ grandaj sed ankaŭ malkontento. Malkonsentoj naskiĝas pro fakto ke la loĝantoj de la regionoj pli malgrandaj ne plu fidis al tiuj grandaj, ĉar ili estas enviciĝintaj ne kiel samsangaj fratoj kiel ili ja estas, sed kiel « malgrandaj ekonomiojn » kaj « potencaj ekonomioj ». Estas ja sciite ke pli potencaj profitas pli ol malpli potencaj.

Kio okazus se la eŭropa popolo returniĝis al sia origina lingvo? Unue, posedante la saman lingvon, kiel tio estis en pratempo, ili pli respektus unu la alian, kaj kien ajn ili irus, ili sentus sin kiel en sia patrio. Due, parolante la saman lingvon, ili komprenus tute bone unu la alian kaj ne naskiĝus miskomprenaĵoj kaj tensioj. Trie, ili eklernus pli bone ĉion akirita en iu regiono por utiligu ĝin favore al la disvolviĝo. Tiuj ĉi kaj aliaj profitoj alportus siajn bonojn al la progreso, preskaŭ la sama, en la tuta nuntempa Eŭropo, kaj ties kulturo estus pli potenca ol aktuale. Ankaŭ la sciencaj malkovroj estus akirontaj pli altan gradon. Survoje al la disvolviĝo estas faritaj multaj

pezaj eraroj, kiuj povus esti flankenlasigitaj ĝistempem, se sin okupus per tiuj pli da homoj. Tiel la povreco ne estus frapinta Eŭropon nek iun alian landon. Ankaŭ por la bonaj kaj kapablaj homoj, estus pli facile gvidi la mondon, por ne lasu ĝin fali en la manojn de kanajlaj regionismaj politikistoj.

Tiamaniere estiĝus komuna monda lingvo kaj la homoj estus unuiĝintaj kaj feliĉaj.

Ĉu estas malfrue por eliri el la mezepokaj opinioj kaj korekti la erarojn? Jam pasis longa tempo kaj reveno al la pasinteco estas malfacila, sed ne malebla. Por tion atingi ne devas liberigi nin disde la regionismaj pensoj kaj labori por la komuna estonto. Kvankam la homo de Eŭropo hodiaŭ estas atinginta ian emancipiĝon, tamen li ankoraŭ portas plurajn regionismaj pensojn, kiuj ne lasas lin sin liberigi de tiuj nomataj nacioj, tial estas tre malfacile por li agnoski la erarojn kaj reveni al la vera vojo. Krome li devas elspezi multe da energio, kvankam la perdita energio alportos nekalkuleblajn profitojn estonte. Sed, se oni transpasas tiujn ĉi erarojn vole kaj malproksimvide, la estonataj generacioj benos ilin, ĉar tiel ili ne bezonus surŝultri la kulpaĵojn de la pasintaj jarcentoj, kulpaĵoj kiuj estas plidikiĝintaj kontinue. Tiamaniere malfermiĝos pli larĝaj eblecoj por la rapidpaŝa disvolviĝo de la homo de Eŭropo kaj de la homaro ĝenerale.

Enesperantigis Bardhyl Selimi, 22an de oktobro 2005